**La babiladaj rondoj** okazos vendrede, je la **19h30**
La gastiganto preparas mem simplan manĝaĵon (manĝon kaj deserton).
La invitatoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Je la fino ĉiuj donacas monon al la gastiganto por partopreni al liaj elspezoj.
Kiam okazas ĉe Espace Dickens, oni ankoraŭ partoprenas al la lupago.

## "Ambaŭ grupoj" la 25-an de novembro

Francisko proponas al ni la lastan babiladan rondon 2016 ambaŭgrupe en Espace Dickens

### "Okcidentaj" :

**la 2-an de decembro**
ĉe Rosario Scopelliti
Ch. de Barberine 6, Lausanne
021 648 76 44 / 079 264 41 08

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

### "Orientaj" :

**la 9-an de decembro**
ĉe M.-Antoinette kaj Knud Sunier
av. des Alpes 150, Montreux
tél. 021 961 38 56 - 079 210 97 75

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6


## Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako – Case postale 246 * CH – 1000 LAUSANNE 22
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56



# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

decembro 2016 – n° 10

## Sabate, la 17-an de decembro

*ĉe Auberge Communale d'Epalinges*



## Zamenhofa Festo

**je la 11-a**

*Vidu ene la detalojn pri tiu renkontiĝo*


*Feliĉan Novjaron, tiun de la "Zamenhof-jaron"*

**Lunde la 9-an de januaro 2017**
*Francisko parolos al ni pri sia Francia turneo*

**Lunde la 6-an de februaro 2017**
*<u>Ĝenerala asembleo</u>*

**Lunde la 6-an de marto 2017**
*Decidota*

*" La reciproka komprenado estus ege plifacila, se oni uzus internacian lingvon."*



*Nicola Tesla (1856 – 1943)*
*Genia inventisto*
*en la kampo de elektro*

# Zamenhofa Festo



"Auberge Communale d'Epalinges"
Route de la Croix-Blanche 27
je la 11-a, sabate la 17-an de decembro

Kiel kutime ni kundividos fonduon. Venu multnombre.

Prezo : po CHF 25.- persone.

La Laŭzana Esperanto-Societo pagos la trinkaĵojn kaj la kafojn.

➢ ***Bonvolu nepre aliĝi antaŭ la 12-a de decembro, pagante la sumon al la konto 10-26785-8 (Laŭzana Esperanto-Societo).***

## Kiel iri ?

Permetroe (M2) ĝis "Les Croisettes" kaj perbuse no 45 aŭ 46 ĝis "Croix-Blanche".


**Ni povas ankaŭ organizi veturadon (076 411 14 55)**

Peraŭte sekvu la vojon Lausanne – Moudon (strato al Berno) kaj poste Epalinges. Envilaĝe la restoracio situas maldekstre.

*Kiam mi iris al la lernejo, ili demandis al mi, kion mi volas esti, kiam mi plenkreskulos. Mi respondis : "Esti feliĉa." Ili diris al mi, ke mi ne komprenis la demandon. Mi respondis, ke ili ne komprenis la vivon.*

John Lennon


## Pluvo



Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
senĉese, senfine, senhalte,
el ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
are gutoj frapiĝas resalte.

Tra la sonoj de l' pluvo al mia orelo
murmurado penetras mistera,
mi revante aŭskultas, mi volus kompreni,
kion diras la voĉo aera.

Kvazaŭ ia sopir' en la voĉo kaŝiĝas
kaj aŭdiĝas en ĝi rememoro...
Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,
en mi batas konfuze la koro.



Ĉu la nuboj pasintaj, jam ofte viditaj,
rememore en mi reviviĝis,
aŭ mi revas pri l' sun', kiu baldaŭ aperos
kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis?

Mi ne volas esplori la senton misteran,
mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;
ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas,
al la freŝo la koro min tiras.

L.-L. Zamenhof